

Claude kaj Andrée GACOND: Respondo al skribemaj geaŭdantoj

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1988 februaro

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1988-08/SRI-1988-08-B-6-Claude-kaj-Andree-Gacond-Respondo-al-skribemaj-geaudantoj.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Ni daŭrigas nian salutadon al la geaŭdantoj, kiuj sendis vivsignojn. Fakte, alvenis leteroj, poŝtkartoj kaj aŭdraportoj el 41 landoj.

En Germanio Orienta ni havas multajn geaŭdantojn.

A.- Ni salutas Ingo FISCHER en Berlino, kiu gvidas junularan esperanto-grupon.

Cl.- Helmer KOCH en Schöneck.

A.- Kaspar MAINZ en Leipzig.

Cl.- Jens MERKER en Cottbus, kiu ĉiam volonte aŭskultas niajn elsendojn el Svislando dirante: "Precipe plaĉas al mi viaj programoj, en kiuj vi pritraktas esperanto-temojn."

A.- Christian PAPENENMEIER en Oelsnitz.

Cl.- Kaj nun, ĉiam laŭ alfabeto ordo, alvenas letero el Gvineo Bissau.

A.- Manulel Louis Pedro ALVES el Bissau aŭdis nin hazarde. Ni citas lin: "Hazarde, kiam mi estis laboranta en iu ajn insuleto ĉe Gvineo maro, precize en Bubaque, mi aŭdis en mia radio-aparato la Esperantan himnon kaj aŭskultis la paroladon, kiu sekvis. Mi lernis la esperantan lingvon antaŭ kelkaj jaroj, sed ne praktikas ĝin, ĉar en la lokoj kie mi loĝis ne staris iu ajn esperantisto. Ĉi tie ne ekzistas alia esperantisto, kun kiu mi povus paroli kaj praktiki."

Cl.- Nun ni iru al Hispanio. Ni salutu Pedro ALCEDO en Bilbao.

A.- Josep ALTADILL en Tortosa aŭskultis nian raporton pri travivaĵoj de irana esperantisto, kaj li aldonas: "Mi jam suferis militon kaj aŭdinte tiun raporton oni bezonas diri laŭtvoĉe, ne plu militon!"

Cl.- Luis BLASCO en Zaragoza sendis poŝtkarton kun reprodukto de la maŭra arto kaj skribis: "Dum sep jarcentoj loĝadis en Hispanio, paceme kaj laboreme, judoj kaj maŭroj kun la hispanoj. Dum tiu periodo Hispanio progresis multe en ĉiaj artoj, sciencaj verkoj, metiartoj." Liaj diroj iom idealigitaj estas alvoko al paco venanta el urbo daŭre travivanta intertnajn konfliktojn. Alia poŝtkarto raportas pri la 43-a Hispana Kongreso de Esperanto en Zaragoza. Tiajn poŝtkartojn kun kongresaj poŝtstampoj ni konservas en la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds favore al la riĉigo de la kolekto de CDELI.

A.- Alcibiades Adolfo GONZALEZ MEANA en Langreo sendis sian adresŝanĝon. Tiuj sendoj de adresŝanĝoj estas ofte la solaj vivsignoj, kiujn ni havas kun regulaj aŭskultantoj, kiuj deziras ricevi novajn programojn.

Cl.- Paulo MELIZ IRACHE en Monzon Huesca.

A.- Fernando MENDIA GONZALEZ en Madrid, kiu informiĝis en la hispana lingvo pri esperanto kaj niaj elsendoj. Eble li lernis la lingvon kaj aŭskultas nin.

Cl.- Rafael RUIZ CRIADO en Barcelona, urbo, kie mi prelegis antaŭ kelkaj monatoj. Eble tiam ni havis la okazon renkontiĝi. Fakte plurajn centojn da esperantistoj mi vidis en la Kataluna Esperanto-Kongreso.

A.- El Hungario aŭdis nin Stefano BENCSIK el Dunaújváros, kiu aŭdis nin okaze de babilado kun niaj skribemaj geaŭdantoj kaj informis hungarajn amikojn pri nia mencio de iliaj nomoj. Li tre regule sendas al ni utilajn aŭdraportojn.

Cl.- Ni salutas Pál FELSŐ en Pest.

A.- Ervin FENYVESI en Budapeŝto.

Cl.- Sándor FERMESZ en Budapeŝto.

A.- Jozefo KIS en Gabzató fiksas sur magneto-bendo niajn perondajn salutvortojn okaze de pasintjara leterkesta respondo.

Cl.- István NAGY en Budapeŝto priskribas esperantistan malsanon. Ni citas : Por kelkaj esperantistoj ekzistas nur unu esperanto, tiu, kiun ili scias kaj parolas. Kaj ĉio, kio ne estas konforma al ilia scio estas malbona. Ankaŭ pri recenzoj István NAGY esprimas pripensindaĵojn. Legante kritikojn pri vortaroj, gramatikoj, libroj, oni vole-nevole venas al la konkludo, ke en esperanto naskiĝas lingve kaj enhave ofte nur fuŝverkoj, precipe la tradukoj. Akademiano nomis la romanon de konata verkisto, la ‘Ĉu-libroj’, *verkaĉo* en sia eseo recenza.

A.- Vilmos SÁGI en Székesfehérvár trovas riĉigon en radioaŭskultado. Ni citas lin : Mi ĝoje aŭskultas viajn multkolorajn, valorajn dissendaĵojn, kiuj tre utilas al mi por ekkoni la mondon kaj esperanto-movadon.

Cl.- Imre SZABÓ en Budapeŝto sendis invitulojn al esperanto-aranĝoj. Fakte, niaj elsendoj malfacile povas anonci okazontaĵojn. Sed tre volonte ni ricevas raportojn pri la okazintaĵoj. Sed la anoncintoj ofte forgesas sendi raportojn pri la koncernaj aranĝoj. Karakterizas la nunan esperanto-movadon tutcerte strebado al organizo de multaj renkontiĝoj, kongresoj, kolokvoj ktp., sed pri tiuj kunvenoj malfacile oni povas poste informiĝi. Espereble en la dua jarcento de la lingvo internacia la esperanto-movado kapablos solvi tiun problemon, kiu tutcerte bremsas la disvolviĝon mem de la lingvo.

El Hungario ni ricevis la kasedon ‘Al venko’ de József DINNYÉS, kaj ni profitas aŭdigi ĝian unuan eron titolitan ‘Ĉiam denove’. - (*muziko*)

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon ni daŭrigos nian salutadon al la skribemaj geaŭdantoj. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi: Ĝis reaŭdo!